



Oficiala Organo
de Svisa Esperanto
Societo S. E. S.

A.Z. Romanshorn
Jaro 1949

N-10 8

45-a Jarkolekto
Dezember

La plej forta kaj plej influa organizajo en la nuntempa Esperanto-movado certe estas

Universala Esperanto-Asocio

kies supertendenca, neŭtrala sinteno permesas la aktivan partoprenon de kiu ajn Esperantisto, sen diferencigo pri raso, nacio religia aŭ politika kredo.

Universala Esperanto-Asocio

per sia delegita reto, kiu ampleksas preskaŭ la tutan mondon, donas altvaloran servon al la praktika Esperantisto, por kiu la Jarlibro de UEA estas konstanta konsultilo.

Universala Esperanto-Asocio

informas pri la plej gravaj okazaĵoj en la Esperanto-movado per sia bele presita, oportunformata, monata organo *Esperanto* Por ricevi la maksimumon de profito el via Esperanto-scio nepre vin aligu al

Universala Esperanto-Asocio

Petu prospekton kaj informon de la Sviza ĉefdelegito:

Otto Walder, Eigenheim, Romanshorn, Svislando



Fluglernejo Altenrhein

Fliegerschule Altenrhein

Gvidanto: Rudolf Herzig

VEL-KAJ MOTORFLUGADO sur bonege flegitaj aviadiloj, kun fidinda fakpersonaro kaj ne laste en kampare ideala regiono. - La komenco ĉiutempe eblas kaj ĝis 20 flugoj ĉe duobla direktilo povas okazi sen iaj formalajoj. Do, ankaŭ vi havas la okazon fari provon. La instruado ĝis nun okazis en germana, franca kaj angla lingvoj, sed eble baldaŭ povos esti farata en Esperanto. Ĉiukaze la ebleco konversacii ne mankas, ĉar ĉiutage dejas Esperantisto sur nia aerodromo. Ni korespondas ankaŭ en Esperanto.

Detalajn informojn donas:

Aerodromo St. Gallen-Altenrhein

telefono (071) 4 13 44

Esperantaj Libroj

Ĉiam granda provizo. Prizorgo el ĉiu eldonejo
Lernolibroj, vortaroj, ŝlosiloj, kovertoj
kartoj, leterpapero

Postulu senpage listojn de via enlanda
libro-agentejo


Otto Walder, Eigenheim, Romanshorn, VIII 12139

FABRIKADO KAJ EKSPORTADO
de

LIGNO-DOMOJ

Seria aŭ individua stilo
18-jaraj spertoj en konstruado de domoj
Peranto de ĉiaj komercaj aferoj
importo kaj eksporto

Franz Rispy, Amriswil Tg., Svislando



Elektromotoroj

ĉiuspecajn
de ĉiu grandeco



Lift-kaj elektromotor-fabriko

Schindler & Cie. AG., Luzern

ARTMIELO

„Bongusta“

JUNIPERAJO

„Bonega“

Neniun matenmanĝon sen tiuj bongustaj
nutraĵoj el Esperantujo!

Prezoj: 5 kg Fr. 19.—, 10 kg Fr. 33.—
(inkl. kaldronetoj). - Dissendoj per rem-
burso aŭ laŭ interkonsentoj, rekte el la
fabriko.

Produktanto: EDUARD LIVERS Rheineck

Poŝtfako 71

Membro de SES

SVISA ESPERO

Adreso de Svisa Esperanto Societo: Grünaustr. Rheineck Adreso de la Redakcio: Eigenheim, Romanshorn

Poŝta ĉekkonto VIII 2139; Abonprezo: por Svislando Fr. 5.—, por eksterlando Fr. 6.—; 15 int. Rkp.
erscheint 8 mal jährlich

ĈIO ŜANĜIĜAS

Jam ree ni troviĝas antaŭ la fino de jaro. Unu fojon pli la mistera rado de l' sorto finis sian jarvojon. Kutime en printempo ĉiuj parolas pri ŝanĝiĝo de la tuta naturo, sed ĉu ne ankaŭ nun alproksimiĝas granda ŝanĝiĝo? Je la fino de jaro oni kutimas unue rigardi malantaŭen kaj poste antaŭen. Oni klopodas ankoraŭfoje ĝoji pri ĉiuj sukcesoj kaj penas forgesi la malagrablajn horojn. Oni rigardas antaŭen kaj faras novajn planojn, bazitajn sur bonaj intencoj, ja eĉ oni jen kaj jen konstruas fatamorganon! Rigardante reen, ni ekvidas multajn laborojn, parte sukcesintajn, parte ne. Tro facile la homo ofte pensas pri rapida sukceso. Ĉiam denove ni devas lerni la atendadon kaj la paciencon. Se ne ĉiuj niaj intencoj kaj deziroj plenumiĝis en la daŭro de l' pasinta jaro, tiam ni ne malkuragiĝu. Se ofte ni devas aŭdi el la buŝo de la skeptikuloj, ke niaj entreprenoj estas senutilaj kaj restos tiaj, tiam ni bone konsciuj, ke tia atako devas esti forta instigo al plia, fidela laboro por nia paca movado. Ni meditu foje pri la fakto, ke nia majstro Zamenhof laboregis preskaŭ dum dudek jaroj, ĝis kiam povis okazi la unua Universala Kongreso. Li neniam perdis la esperon kaj kuraĝon. Li estu nia ekzemplo. La respondo al la homoj pretekstantaj: "Mi ankaŭ lernus Esperanton, se estus pli multaj Esperantistoj" nur povas esti: "Se neniu sin oferas, nenio povas kreski." "Se neniu komencas, neniu povas fini iun verkon. Mi estas fiera, aparteni al la kuraĝuloj, kiuj agas kaj ne nur parolas"! Pensante tiel, estas jam farita granda peco de nia vojo.

Serioze observante la situacion internacian, oni konstatas ĉiam denove la nerefuteblan fakton, ke la mondo absolute bezonas komunan lingvon kaj ke Esperanto estas la unusola, kiu ĉiutage pruvigas la plenan taŭgecon en la praktika vivo. En tiu senco ni volas alpaŝi la novan jaron, tiam ne mankos al ni la entreprenemo kaj persistemo. El la multaj, bonaj intencoj, kiujn ni ree forĝas, ni volas efektiviĝi la plej eblon, kaj jen "Ĉio ŝanĝiĝos":

Ĉiu, kiu disponigis siajn fortojn kaj helpis nin, bonvolu akcepti ĉi-loke la plej sinceran dankon. Al ĉiu leganto korajn bondezirojn kaj la proksimaj festotagoj kaj precipe por la nova, promesplena jaro 1950. F.L.



RADIO .

Esperanto Radio Kalendaro.

La tempindikoj estas laŭ mezeŭropa tempo, do valida por nia lando.

I = Informoj, P = Parolado, K = Kurso.

Ĉiutage:

15.45 - 16.00 Praha 1935 kaj 31,41 m I.
18.15 - 18.30 Paris 48,82 m I.
19.45 - 20.00 Sofia 39,11 m I.
22.00 - 22.15 Praha 49,92 m I.

Dimanĉo:

06.30 - 06.35 Wien 506, 31 kaj 41 m I.

Lundo:

00.30 - 00.35 Budapeŝt 549,5 m I.
08.15 - 08.30 Sveta Radio 49,46 kaj 19,80 m P.
16.15 - 16.30 Sveta Radio 27,83 kaj 19,80 m
22.45 - 23.00 Praha 470, 325 kaj 259 m

Mardo:

00.30 - 00.35 Budapeŝt 549,5 m I.
02.15 - 02.30 Sveta Radio 49,46 kaj 31,46 m
09.05 - 09.20 Paris 386,8 m K (ĉiu dua mardo)
12.55 - 13.00 Bern 48,66, 31,46 kaj 16,87 m P
15.15 - 15.30 München 405 kaj 48,70 m K
ĉiun duan mardon.
18.40 - 18.45 Bern 48,66, 31,46 kaj 19,60 m P.

Merkredo:

20.15 - 20.30 Warszawa 48,23 m I
22.45 - 23.00 Praha 470, 325 kaj 259 m
23.15 - 24.00 Praha II 325, 269 kaj 219 m
Verda Stacio, nur unua merkredo.

Ĵaŭdo:

00.30 - 00.35 Budapeŝt (kiel lunde)
12.55 - 13.00 Bern (kiel marde) P
18.40 - 18.45 Bern (kiel marde) P
23.00 - 23.10 Ostrava 259 m.

Vendredo:

16.40 - 16.55 Wien 228, 41, 31 kaj 25 m I.
ĉiun duan vendredon.
21.50 - 22.00 Praha 470, 325 kaj 269 m I.

Sabato:

00.30 - 00.35 Budapeŝt (kiel lunde)

KRISTNASK- aŭ NOVJARDONACO.

al viaj en- kaj eksterlandaj geamikoj kaj gekorespondantoj:

Niaj Svisaj Eldonaĵoj!

PENSOJ DE ZAMENHOF fr. 1.-
plej inda tutmonda propagandilo
DU AMOSENTAJ NOVELOJ fr. 2.05
Imenlago de Th.Storm kaj Maruška
ĈE LA SANKTAJ AKVOJ en du volumoj fr. 6.10
la fama romano de J.C. Heer el la
valeza montegaro.
Mendu tuj, rekta sendo pere de nia libroservo.

LA ENLANDA MOVADO

KURSOJ. Ni estas informitaj pri kursoj por komencantoj en Bern, Winterthur kaj Zürich.

RHEINECK. La lastaj 2 kunvenoj okazis la 14-an de nov. kaj 12-an de dec. En la unua la prezidanto enkondukis "La 15 minutojn pri la lingvo". Tiu programo estis danke aprobita de la membroj kaj oni esprimis la deziron, en tiun kunvenon enplekti tiun temon. Poste ni aŭdis prelegon pri la libro "La Longa Vojo". Ankaŭ ĉi-rilate la intereso estis sufiĉe granda. La babilan horeton ni pasigis, farante esperantajn kvartetludojn, kio ĉiam estas bonvena paroligilo.

La decembran kunvenon ni aranĝis en la hejmo de l'prezidanto, por samtempe festi la Zamenhofan tagon kaj kristnaskon. La edzino de l' grupestro regalis nin per dolĉaĵoj memfaritaj. La ĉefa punkto en la programo estis sendube la speciala radioprogramo, prezentita de nia "Rheinecka Studio"! Aŭdiĝis voĉoj de plenkreskuloj kaj infanoj, deklamante esperantajn poemojn, kantojn ktp. Precipe la Esperanto el infana buŝo estas ĉiam io alloga.

La venonta kunveno okazos meze de januaro. Per plenvaporo ni volas komenci la novan jaron. El nia plej orienta grupeto ni disradias sincerajn bondezirojn je la festotagoj, al ĉiu leganto.

BERN. Dum la oktobra ĝenerala kunveno, ESB elektis novan estraron. Prezidanto fariĝis s-ro E. Keiser, kiel vicprezidanto funkcias la ĝisnua prezidanto s-ro Streun, kasisto elektiĝis s-ro O. Berger kaj kromaj komitatanoj fariĝis f-ino Weigelt kaj s-inoj Fischer kaj Grünig.

Kurson por komencantoj gvidas s-ro Krenger, partoprenas 11 interesuloj.

La Zamenhofvespero okazos la 12-an de dec. en hotelo Metropol, eksterurbanaj estas kore invititaj ĉeesti.

ZÜRICH. Dum la oktobra kunveno s-ro Müller rakontis pri la interesa vojaĝo al Londono, Bourne-mouth kaj Parizo kaj la enhavoriĉa kongresprogramo. Post tiuj okcidentaj informoj ni aŭdis dum nov. sciigojn pri nia movado en la orientaj ŝtatoj pere de Internacia Kulturo. La 8-an de dec. ni aranĝis Zamenhofan memortagon kun mallongaj paroladoj pri resp. de Zamenhof. Ankaŭ ni tuŝas mallonge la venontan jaron: meze de jan. ni komencos la duan kurson por komencantoj (15 vesperoj po 2 horoj) en la lernejo Grossmünster, ĉiam merkrede de la 20 ĝis 22 horo.

KONSILANTARO. La Centra Komitato, interkonsente kun la ĉefkonsilanto, validigas la jenan, de la Ĝenerala Kunveno akceptitan liston de la

Grupaj Konsilantoj "a":

BASEL: s-ro d-ro A. Bader; BERN: s-ro W. Streun; BIEL: s-ro W. Voirol; HERISAU: s-ro E. Schwendinger; LUZERN: s-ro H. Graf; MORGES: s-ro Ch. Jayet; RHEINECK: s-ino H. Herzog; ST. GALLEN: f-ino A. Früh; THUN: f-ino A. Eberhard; VEVEY: s-ro K. Hiltbold; ZÜRICH: s-ro W. Laederach.

enoficigas la jenajn

Centrajn Konsilantojn "b":

s-ro d-ro A. Bader, Basel; s-ino H. Fischer, Bern; s-ro J. Gilliard, Neuveville; s-ro d-ro M. Jaccard, Zürich; s-ro Ch. Jayet, Morges; s-ro J. Koch Solothurn; s-ro R. Zollinger, La Chaux-de-Fonds; s-ro d-ro A. Baur, Bern; s-ro J. Hohl, Flims.

La Grupaj Konsilantoj "a" estas la perantoj inter la Centra Komitato kaj la grupoj. Ili raportu fidele al la CK pri la grupa vivo kaj kontroli

la administran akuratecon en siaj societoj.

La Centraj Konsilantoj "b" estas gravaj funkciuloj de SES, aŭ bonvolaj helpantoj de la CK. Ili ne povas aparteni al la CK mem, sed kunlaboras rekte kun ĝi. Tiuj konsilantoj studu propagandajn kaj administrajn problemojn kaj sugestojn submetitajn de la CK, de la konsilantoj aŭ de aliaj personoj.

La ĉefkonsilanto: R. Zollinger.

NIA FIDELE MEMBRARO

pligrandiĝis kaj ni bonvenigas en nia rondo la jenajn novajn membrojn:

Sinjoron J.W. Kobler, Abtwil St.G.
Sinjoron S. Jolidon, Lausanne.
Sinjorinon B. Stäuble, Basel
Sinjorinon L. Grütter, Samedan
Sinjorinon Doriot, Vevey.

Krome la kasisto informas nin, ke la jenaj membroj helpis kiel

Membro-Subtenanto (plikotizo min. fr. 20.-)

Sinjoro R. Zollinger, La Chaux-de-Fonds.
Sinjoro W. Voirol, Biel.
Sinjoro Ch. Jayet, Morges.

Kiel Membro-Helpanto (plikotizo min. fr. 10.-)

Sinjoro d-ro A. Baur, Bern.
Sinjoro P. Le Brun, Kreuzlingen.
Sinjoro Ed. Pitton, Vevey.
Sinjoro E. Keller, Männedorf.
Sinjoro K. Hiltbold, Corseaux.
Sinjoro A. Rehmann, Genève.
Sinjoro K. Jost, Zürich.

Plej koran dankon por tiuj subtenoj. Ni scivolemas, ĉu la kristnask-infano pligrandiĝos tiun liston, por ke ĝi fariĝu tiom longa kiel lastjare. Antaŭdankon por lasthoraj surprizoj.



Sinjoro doktoro, bonvolu fari injekton en mian postajon, ĉar mi ricevis hodiaŭ la lernejan ateston kaj devus ĝin montri al la patro!

FERIA KURSO HÄBERNBAD.

En nia lasta numero skrib-eraro kaŝiĝis antaŭ la redaktoro. Vi certe jam konstatis, ke progresiga kurso de s-ro Hohl ne bezonas lo monatojn. La ĝusta dato por tiu kurso estas la 24-a de julio ĝis 2-a de aŭgusto.

Al unu el la proksimaj "Svisa Espero" ni aldonos apartan prospekton kun aliĝilo, per kiu ni faros ankaŭ en eksterlando propagandon.

Tuj post tiu kurso okazos "Antaŭkongreso Basel", pri kiu ni informos vin kiel eble plej baldaŭ pli detale.

S E S - T A G O 1950. Vidigi, ke Neuveville ***** momente ne povas gastigi en hoteloj tiom da gastoj, kio ni atendas kaj krome, ke rezervigo de salono estas malfacila. Je nia bedaŭro ni devas do rezigni je tiu ĉarma loko.

Peliĉe ni tuj trovis la konsenton de la Bernanoj por nia jara kunveno kaj ni povos restadi en nia verda hotelo Metropol. Plej verŝajne niaj kunvenoj okazos la 25/26-an de marto. Bonvolu nepre rezervi tiujn tagojn por nia rendevuo. La proksima numero jam enhavos programon kaj raportojn.



ANGLETERRE. Le ministère britannique de l'Education a délégué au 34e congrès espérantiste universel à Bournemouth deux observateurs qui ont participé à diverses assemblées, entr' autres aussi à celles du comité de l'Ass. Espérantiste Universelle pour s'informer de l'emploi pratique de l'Espéranto

AUTRICHE. Dans le rapport de la Fédération Espérantiste Autrichienne, l'évolution de la langue auxiliaire Espéranto est ainsi citée: Il est réjouissant de constater combien l'Espéranto, depuis une année, a réalisé d'importants succès. Des chaires d'Espéranto ont été créées dans les universités de Innsbruck, Salzburg et Graz.- Des cours d'Espéranto sont donnés à l'Union des Policiers de Vienne et Innsbruck.- Les radios de Vienne et Graz ont introduit des programmes en Espéranto et le Bureau national du tourisme à Vienne a introduit l'Espéranto dans ses services pour l'étranger.- Selon décision du maire de Graz une importante place de la ville a été baptisée Place de l'Espéranto. Tous ces succès ont été couronnés par l'émission d'un timbre "Espéranto" par les PTT autrichiens.

SUISSE. Le département politique fédéral a délégué au 34e congrès espérantiste universel l'attaché de presse de notre légation à Londres.

USA. La Société Américaine pour l'Education, la plus importante association d'instituteurs des USA vient d'éditer une brochure de 16 pages pour la propagande de l'Espéranto, dans la série connue "Personal Growth Leaflets" (feuillettes pour l'instruction individuelle). Cette première édition est de 20.000 ex. et d'autres suivront. La brochure qui porte le titre "Espéranto the World Language" (Espéranto la langue universelle) trouvera sans doute aussi un accueil sympathique parmi nos instituteurs.

PROPAGANDO VOJAĜO

Komisiita de UEA, prof. d-ro I. Lapenna faros en la venontaj monatoj propagand-vojaĝon tra Eŭropo. Momente li troviĝas en Francujo kaj jam en multaj lokoj tre sukcese prelegis, ekz. en la pariza universitato La Sorbonne antaŭ 450 personoj kaj en Versailles ĉeestis eĉ 600 interesuloj. D-ro Lapenna estas al ni famkonata, kiel treege bona oratoro kaj ni informas jen pri la temoj, kiujn li pretas pritrakti:

1. La Internacia Lingvo kaj ĝia rolo.
2. Jugoslavujo, la lando de pitoreskaj urboj, mirindaj belaĵoj kaj antikva kulturo.
3. Parizo - la urbo de la 35-a Univ. Kongreso.
4. Kiel vigligi la Esperanto-movadon.
5. Kio estas U.E.A. ?
6. Temo el kampo de internacia publika juro.

Prelegoj 1-3 okazas en Esperanto kun traduko en la nacian lingvon. La interpretanto ricevos antaŭ la prelego la manuskripton kaj donu, post kiam la preleganto parolis dum 5 - 10 minutoj mallongan resumon en la nacia lingvo. Prelegoj 2 kaj 3 kun multe da lumbildoj, por kiuj d-ro L. kunportos aparaton, sed bezonos blankan tolaĵon. La kunvenoj devas okazi en konvena salono, ne pli granda ol por 250 personoj, kiam temas pri lumbildprelegoj. D-ro Lapenna konsentas prelegi plurfoje tage, matene kaj posttagmeze en lernejo vespere antaŭ plenkreskuloj. Tre dezirata estas

ENGLAND. Das britische Erziehungsministerium hat an den 34. Esperanto-Weltkongress in Bournemouth zwei Beobachter abgeordnet. Diese nahmen an verschiedenen Veranstaltungen teil und wohnten auch einer Sitzung des Komitees der internationalen Esperantoliga bei, um sich über die praktische Verwendung von Esperanto beraten zu lassen.

Für die Petition an die UNO sind zu Gunsten von Esperanto nicht weniger als 16.000.000 Unterschriften aus allen Ländern der Welt eingegangen.

OESTERREICH. Im Rapport des österreichischen Esperanto-Bundes wird die Entwicklung der Welt-sprache Esperanto zusammenfassend wie folgt zitiert:

"Es ist erfreulich zu konstatieren, dass Esperanto seit einem Jahr mehrere bedeutende Erfolge zu verzeichnen hatte. Esperanto-Lektorate wurden geschaffen an den Universitäten Innsbruck, Graz und Salzburg. Bei den Polizeikorporationen von Wien und Innsbruck sind Esperantokurse eingeführt worden. In Radio Wien und Graz wurden Esperanto-Programme eingeschaltet und das staatliche Fremdenverkehrs-bureau in Wien hat Esperanto in seinen Dienst aufgenommen. Ebenfalls erwähnenswert ist die Schaffung eines neuen, 354-seitigen Wörterbuches "Deutsch-Esperanto". Einem Beschlusse des Stadtrates von Graz zufolge wurde einem bekannten Platz in der Stadt der Name "Esperantoplatz" gegeben. All diese Erfolge werden schliesslich gekrönt durch die Ausgabe einer Esperanto-Briefmarke, was durch die österreichische PTT veranlasst wurde".

SCHWEIZ. Das Politische Departement delegierte den Presse-Attaché unserer Londoner Gesandtschaft an den 34. Esperanto-Weltkongress in Bournemouth.

USA. Die amerikanische Gesellschaft für Erziehung, die grösste Lehrer-Vereinigung in USA, hat kürzlich eine 16-seitige Werbebroschüre über Esperanto herausgegeben, in der bekannten Serie "Personal Growth Leaflets" (Flugblätter über Selbstbildung). Die erste Auflage beträgt 20.000 Exemplare und weitere werden bald folgen. Die Broschüre trägt den Titel "Esperanto the World Language" und dürfte auch bei unserer Lehrerschaft Anklang finden.

A T E N T U. Ĉi-foje estas konsilinde ne tuj transdoni tiun tekston al la red-akcioj. Estas certa danĝero, ke pro festotagaj preparoj ĝi perdiĝus. Pacienca preferinde ĝis la unuaj trankvilaj tagoj de la nova jaro. Sed tiam nepre!

prelegoj en universitatoj kaj gimnazioj. Dum sia restado li pretas ankaŭ gvidi perfektigajn kurs-ojn.

Por aranĝi la vojaĝadon kiel eble plej racie kaj ŝpari vojaĝkostojn, la propaganda oficejo en Malmo deziras fari planon. Ni petas do grupojn kaj izolulojn, tuj anonci siajn dezirojn al nia SES-prezidanto ĝis plej malfrue lo-a de jan. La kondiĉoj estas tre favoraj. Sen alskriboj la OK ne povos profiti tiun unikajn okazon.



Venu tuj ĉi-tien - sed malrapide!

KONGRESOJ KURSOJ FERIOJ.

35-a UNIVERSALA KONGRESO de ESPERANTO.

5-a ĝis 12-a de aŭg. 1950 en Parizo.

II-a INFORMILO (mallongigita)

LKK informas nin, ke estas malfacila trovi la necesan nombron da hotelĉambroj, sed ke ĝi pere de COOK-oficejo entreprenos ĉion por loĝigi inde ĉiun gaston. Bonvolu atenti jenajn aranĝojn:

- a. hotel-ĉambroj. Kun trinkmono, sed sen la manĝoj fr.fr. 450 - 1200 po tago.
- b. kun-restejoj. En liceoj kaj superaj lernejoj kun propra lito kaj littukaro, po tago:
 - lito kaj matenmanĝo fr. 150
 - lito kun maten- kaj tag- aŭ vesp-ermanĝo fr. 400
 - lito kun 3 manĝoj fr. 650
- c. Tendo propra. Prezoj laŭ sciigo.

Aliĝiloj, haveblaj ĉe SES-prezidanto kaj sekr.

Svisa karavano. Ne jam anoncis sin gvidanto. provizore vi povas pagi vian kongres-kotizon al O.Walder. Plena kongreskotizo
ĝis 31.12.49 sv.fr. 20.20
ĝis 31. 3.50 sv.fr. 24.25

por familianoj kaj gejunuloj reduktita kotizo. Kun pago ĉiam sendu ankaŭ plenigitan aliĝilon.

Blinduloj. La laŭregula senpaga aliĝo de Blinduloj kaj iliaj gvidantoj devas veni al la kongresa komitato pere de Landa Asocio. La CK elektis por tiu tasko F-inon L. Klee, Lindenstr. 134 St.Gallen, al kiuj geblinduloj bonvolu skribi.

En lasta momento atingis nin pliaj informoj pri tiu multpromesa kongreso en tiom distriga urbo. Legu, alŝopiru, sed ankaŭ aliĝu:

Kongresejo. Definitive fiksita estas nun "La Sorbonne" sidejo de la Pariza Universitato (la plej granda de Eŭropo). La Malferma kaj Ferma Kunsidoj estos en la granda amfiteatro, majstre dekoraciita, kiu povas enteni 2700 personojn.

Balo. La tradicia balo kun naciaj kostumoj okazos en la admirindaj salonoj de Hotel Continental la plej luksaj en Parizo, kiuj povas enteni 3 dancantojn.

Kongresa poŝtoŝeĵo. La ministro de la franca PTT konsentis pri instalo de poŝtoŝeĵo kaj pristudas la eldonon de speciala marko kun esperanta teksto.

Transportoj. La administracio de la francaj fervojoj konsentas al la kongresanoj ek de la limo rabaton de 20 % por individua vojaĝo rabaton de 30 % por kolektiva vojaĝo.

Somera Universitato. Serio de 8 prelegoj estos farotaj en Sorbonne de famaj profesoroj, praktikantaj Esperanton. Invitota estos neesperantistaj kleruloj por ke ili povu persone konstati la tujan komprenon ĉe diversnacia publiko.

Ekskursoj. La informa bulteno entenas tiom multe ke ni povas nur aserti, ke ĉefe oni vizitos la faman urbon, tiom varian. Muzeoj, monumentoj, Eiffel-turo, Montmartre ktp.

Postkongresaj ekskursoj. Ankaŭ tie abundo, ni esperas ke aperos prospekto por elekto.

Antaŭ ĉio nun necesas aliĝi, por profiti de la plej malalta kongres-kotizo, valida ĝis fine de tiu jaro.

Por gejunuloj validos aparte malaltaj prezoj por la loĝado kaj manĝado, informigu rekte pri tio.

INTERNACIA JUNULARA KUNVENO de Tutmonda Junular-
***** Organizo okazos en
1950 sub la patron-
eco de la ĉef-urbestro en la belege situata urbo
KONSTANZ apud Bodensee.

Ĉar temas pri Junulara Renkontiĝo, la aĝlimo por en- kaj eksterlandaj partoprenantoj estas 30 jaroj. Escepto por ĝeinstruistoj, karavanestroj kaj specialaj invititoj.

La 8-taga programo de la IJK antaŭvidas germanan, aŭstran, nederlandan, britan kaj francan fest-vesperojn, kie el la naciaj kutimoj estos donota eltranco per teatraĵoj, popoldancoj kaj popolkantoj. La ĉeftemo de la debatoj estas

Esperanto kaj la Junularo.

Pri tiu temo ankaŭ okazos oratora konkurso. Plie tre interesaj ekskursoj estas planitaj al Svislando kaj Aŭstrujo.

Dato: dum 8 - 10 tagoj en julio aŭ aŭgusto. Ek de la germana landlimo karavanoj, por ĝui 50 %an rabaton ĉe la fervojoj.

Informoj, aliĝiloj, prospektoj povas esti petataj kontraŭ respondkuponon ĉe la Loka Organiza Komitato, Konstanz, Grünang 9. Detaloj, listoj de la partoprenantoj ktp. aperas en "La Juna Vivo".

Jam nun esperant-lingva prospekto povas esti petata senkoste de "Städt. Verkehrsamt, Konstanz"

NORVEGA REZOLUCIO.

"La Jarkunveno de Norvega Esperantista Ligo, en Trondheim, pentekoste 1949


konstatas ke la proponoj de pastro J. Kubacki, Usono, pri ŝanĝoj en la ortografio kaj vortaro de E. estas kontraŭaj al la fundamento de E., kaj konstatas ke la agado de pastro J. Kubacki povas nur disigi la fortojn de la E-movado, anstataŭ kunigi ĝin, kaj rekomendas al la Esperantistaro tutmonda malaprobi la proponojn de pastro J. Kubacki kaj ĉiamaniere kontraŭlabori lian agadon, por la bono de nia afero, kaj admonas al pastro J. Kubacki tuj ĉesigi sian subfosadon, en la intereso de la internacilingva movado".

Ni sincere ĝojas pri tiu rezolucio. Intertempe ankaŭ aliaj profetoj vekigis, sed plej malĝojiga estas, ke eks-vicprezidanto de la akademio, s-ro Grau-Casas dissemas saman legonon.

Imagu al vi la verdan printempon por niaj kontraŭuloj, se ili povus heroldi ke la Esperantistoj akceptas ŝanĝojn. Tio estus mortbato por nia movado, tiom longe, ke ĝi ne estas ie oficiale akceptita.

La supersignoj povas malhelpi sole al presistoj kaj telegrafistoj. Se iu el ili kredas, ke E. ne estas utiligebla pro la supersignoj, tiam ili ekzercadu en ĉeĥa aŭ bulgara lingvoj, tiam la malmultaj esperantaj tegment-literoj estos aĝrabla surprizo.

K U N H E L P U t Ni ne jam kolektis sufiĉe da
ooooooooooooooooooooo anoncoj por la kovriloj por
nia gazeto en 1950. Por la
titolpaĝo ni havas bonegan proponon kaj ĝis la
unaj tagoj de januaro necesas pleni la lastan
paĝon kun pagitaj anoncoj. Subtenu nin en varbado,
sendu tekstojn al la redakcio, jen la tarifo:
tuta paĝo fr. 220.-
duona paĝo fr. 110.-
kvarona paĝo fr. 60.-
okona paĝo fr. 30.-



Post la komenca kurso.

Kion fari je la fino de la komenca kurso? Vi ne volas forgesi ĉion, kion vi ĵus lernis. Vi ne volas resti "eterna komencanto", ĉu? Do kiel fari progresojn en Esperanto?

Unue ripetu vian lernolibron aŭ, se vi jam tro bone konas ĝin, uzu por tiu celo la "Esperanto-Schnellkurs" de Hans Koch.

Due korespondu. Petu adresojn de via instruisto aŭ de la koresponda fako de SES, prenu ilin el ia gazeto, sed ne el la ĵarlibro de UEA. Komencu per simplaj bildkartoj. Vi trovos utilajn frazojn en la libreto "Ĉu vi deziras korespondi?" de Margreth Noll (fr. -.35)

Trie legu facilan libron por komencantoj. Kolekto de mallongaj legaĵoj estas:

Senhalte al la celo de Alois Norbert (-.80) aŭ Gaja leganto per Esperanto de P.E. Schwerin (1.15)

Eble vi ne ŝatas mozaikon de mallongaj pecetoj, sed preferas veran rakonton en simpla stilo.

Tiam legu:

La Forto de l'Vero de Adi (2.40) aŭ Kudlago, la malgranda Eskimo de van Hichtum (-.90)

Ĉiuj tiuj libroj estas malmultekostaj, kiel vi vidas, kaj kompreneble haveblaj ĉe Otto Walder, Eigenheim, Romanshorn.

Por legi vi ankaŭ bezonas vortareton, kiel la Heroldo-Taschenwörterbuch (1.90)
Nepre notu la novajn vortojn kaj lernu ilin.

Kvare serĉu okazon por paroli Esperanton. Vizitu regule la klubkunvenojn kaj tie rakontu anekdoton, kiun vi legis kaj lernis parkere.

Plej bone estas, se la klubo povas organizi progresigan kurson post la komenca. Sed ankaŭ izolaj Esperantistoj povas fari progresojn per legado kaj korespondado.

Se vi havas iom da lingva talento, preparu la "Ateston de kapableco" de S.E.S. Oni laboras pli bone, kiam oni havas antaŭ la okuloj difinitan celon, nome ekzamenon.

Eble mi vidos vin.

(el la kolekto "Dum noktoj senstelaj" de Danjan Vahen-Svetinov).

Eble mi vidos vin inter tiuj, kiuj feliĉas ĝojkrie iros laŭ stratoj plenplenaj.

Eble mi vidos vin inter tiuj, kiuj plorantaj sencele vagantaj iros laŭ vojoj perditaj.

Eble mi vidos vin inter tiuj, inter kiuj estos mi.

EDZIĜO. La 5-an de novembro edziĝis nia membro s-ro Werner Liechti el Uetendorf (la frato de nia prezidanto) kun fraŭlino Lina Pfister. Ni kore gratulas al ambaŭ kaj deziras multe da feliĉo por la estonto. Li estas membro de SES kaj certe ankaŭ la edzino baldaŭ esperantiĝos.

Tiu muzeo, kreita laŭ sugesto de d-ro F. Zamenhof frato de nia majstro, estas kolekto de libroj, fotoj, afiŝoj, insignoj, flagoj ktp., kiuj koncernas la mondlingvan demandon, do krom Esperanto ankaŭ la diversajn projektojn. La fakto, ke 98 % de la kolektitaĵoj koncernas Esperanton donis al la muzeo sian nomon.

La sugesto de d-ro F. Zamenhof vekis ĉefe la intereson de la aŭstra reprezentanto dum la Danziga Kongreso, kiu dank al favora subteno de la tiama kanceliero Seipel ricevis ejon en la fama Hofburg de Vieno. La komenco estis tre modesta kaj helpis s-ron H. Steiner du meritplenaj samideanoj, Sintal kaj Weber. La iniciantoj do kolektis materialon, ordigis ĝin, bindigis gazetojn, eĉ mem devis purigi kaj hejti la ejojn, se foje ne mankis karbo, ĉar mono mankis dekomence.

Kun la tempo kolektiĝis multe da interesajoj, kiel ni mem konstatis dum la Universala Kongreso en 1937. La ejoj en Hofburg estas tre konvenaj por tiu celo. Tamen, apenaŭ ĉio estis agrable aranĝita venis la Nazi al Aŭstrujo, fermis la muzeon kaj konfiksas la kapitalon. Peliĉe la tuta materialo jam antaŭe estis deklarita kiel posedaĵo de la Nacia Biblioteko Aŭstria, do ĝi povis esti magazinita kaj konservita dum la multaj ĵaroj de okupiĝo kaj milito.

Nun la Nacia Biblioteko povis ree disponigi ejojn en la Hofburg, ĉio estas ree videbla, ankoraŭ la fondinto, s-ro H. Steiner laboras, laboregas kaj batalas por ricevi la monajn rimedojn, tiom necesajn ankaŭ por tiu celo. Li ĵus direktis alvokon al ni kaj ni volonte subtenas lin tiusence kaj invitas vin je subteno, laŭ eblecoj:

1. per alsendo de interesa materialo.
2. per promeso fariĝi subtenanta membro por 1 jaro, kotizo 3 respondkuponoj (fr. 1.20)
3. per subskribo kiel Dumviva Membro kaj unufoja pago de almenaŭ 25 respondkuponoj (fr. 10.-)

Por faciligi al vi la subtenon de tiu certe inda entrepreno, la konto de nia libroservo, VIII 12139, O.Walder, R'horn, estas je via dispono.



Petro, bonvolu klarigi kio estas la opozicia partio!

Hu, jes, la opozicia partio estas en la lando tio, kio vi estas en nia hejmo!

Prezoj po volumo broŝ. fr. 4.40 bind. fr. 5.50		

Spite de perdo, pro prezredukto kaj malvalorigo de la sveda krono, vi profitu de tiu favoro.

RECENZOJ



Esperanto-Schnellkurs de Hans Koch, München.
Dua eldono 1949 Fr. 1.10
Tiu-ĉi malgrandformata libreto donas sur 52 paĝoj la gramatikon de Esperanto kun kelkaj ekzercoj. Ĉio estas klara kaj bone aranĝita, kaj mi trovas la libron tre utila. Eble ĝi estas tro mallonga por lerni el ĝi Esperanton, sed ĝi estas bonega por rapida ripeto de la gramatiko post la komenca kurso. La ekzercoj konsistas el frazoj el la ĉiutaga vivo kaj ne mankas traduktaskoj el la germana lingvo. Mi rekomendas la libron al la personoj, kiuj jam scias iomete Esperanton sed bezonas ripeton.

J.H.

KORESPONDU !

La CK havis ĝis nun sufiĉe da laboro pri ricevitaj kaj de membroj alsenditaj petoj je korespondado el eksterlando. Ni deziris jam delonge transdoni la prizorgon de tiu fako al intereso kiun ni feliĉe nun trovis. Elektiĝis kiel ĉefo de la koresponda fako Sinjoro O. Wegmann, Oberto 26, Winterthur. De li vi povas jam nun ricevi taŭgajn adresojn, dum malonge tempo li kolektis pli ol 30. Ke vi aldonas afrankon por lia respondo estas ja komprenebla, ĉu ne? Se la estonto montras, ke spite de tiu servo estas dezirinda publikigi adresojn eksterlandajn en Svisa Espero ni kompreneble faros.
Pri la granda valoro de korespondado ni certe ne povas diskuti, legu ankaŭ sub "Lingva Angulo".



Por eviti interrompon en liverado de via ĝis nun abonita gazeto, mi invitas vin al repago de la abono. Dum januaro komencas la abon-periodo de diversaj gazetoj. Abonojn por ĉiuj gazetoj, ankaŭ tie ne menciitaj, prizorgas O. Walder, Romanshorn.

HEROLDO de ESPERANTO	duonmonata	fr. 16.50
	t.d. fr. 10.- tuj, resto ĝis majo.	
ESPERANTO	monata	fr. 5.-
LA PONTO	dumonata	fr. 2.50
SVENSKÁ ESP. Tidningen	monata	fr. 5.70
SLOVAKA ESPERANTISTO	monata	fr. 7.-
MONDA TRIBUNO	monata	fr. 7.-
MALGRANDA REVUO	kvaronjara	fr. 4.80

SVISA ESPERO No. 1/1950:

Redakfino: 15-a de januaro

Apero: laŭ varbado de anoncoj por la kovrilo.

VIA kunhelpo do estas influa.

INTERNACIA HELPSERVO DE S.E.S.

Ne longajn klarigojn ni donu pri nia helpservo. Hodiaŭ parolu kelkaj ricevintoj de subteno, ĉu per per nutraĵoj, ĉu per ege bezonataj medikamentoj.

.... Certe vi ne povas imagi la entusiasmon, kiun vekis en mia familio via letero de la 22.10., kun la kuponoj por ricevi nutraĵojn. Ĉar mi mem pro malforteco ne kapablis iri al la disdonejo, mia edzino iris kaj kunalportis la bonegajn nutraĵojn. Ŝi vere ne povis reteni la larmojn, vid-al-vide de tiaj riĉaĵoj, kiuj ebligis al ŝi, dum kelkaj semajnoj pligustigi kaj precipe fari pli nutraj la ĉiutagajn manĝojn. Kune kun zorge ŝparita sukero ĝi donos al ni festotagan trinkaĵon, tiu bonega kakao ricevita. La mielon ni donos ekskluzive al nia 13-jara filo, kiu estas tre alttalenta, sed korpe vera skeleto. Tial ni dankas al vi, karaj samideanoj, por via oferego, precipe tial, ĉar ĝi fluas el vera, pura homamo.

(Malsanulo en orienta zono de Germanujo)

Mi bone ricevis la tiel bezonatan medikamenton por mia malsana edzino. Bonvolu akcepti miajn plej sincerajn dankojn por via valora helpo. La medikamento ne estas havebla en nia lando kaj tial ni ege ĝojas pri la kortuŝa helpo de la svisaj samideanoj.

(Malnova Esperantisto en Ĉeĥoslovakujo)

Mi bone ricevis la urĝe bezonatan medikamenton "Streptomycin" kaj tre kore dankas. Mi ne povas forgesi vian helpon. Tio estas por mi granda servo, ĉar mi jam delonge serĉis kiel prizorgi al mi tiun tre bezonatan kuracilon. Mi volas pagi al vi la elspezojn kaj tre esperas, ke per la konsentita vojo mi sukcesu. Kiel dankesprimon mi intencas skribi artikolon al Svisa Espero.

(Tuberkulozo-malsanulo en Jugoslavujo)

Ni daŭrigos alian fojon ĉerpi tiajn dankesprimojn el leteroj de samideanoj, al kiuj ni povis porti iom da lumo en la malhelecon de longa suferado.

AGADO NECESAS !

Ĉe transiro al nova jaro oni volonte promesas al si plibonigon en iu aŭ alia rilato. Perdi ian emon, plidiligentiĝi por io ajn aŭ dorloti iun. Eble ni tute forgesis la Esperanto-movadon, ke ankaŭ favore al ĝi oni povas esprimi ian promeson. Aŭ ĉu vi kredas, ke tio estas superflua? Ĉio pravas la kontraŭon. Do, ni esploru nian kampon:

1. utiligi la "Gazet-lupeon" por aperigo en via loka gazeto; se vi jam faras tion, en via faka jurnalo.
2. subteni la landan societeton per kotizo kiel Membro-Helpanto (min. fr. 10.-) aŭ eĉ kiel MEMBRO-Helpanto (min. fr. 20.-).
3. Varbi vian amik(in)on por la proksima kurso aŭ tralabori kun ili nian hejmkurson "Esperanto in 5 Lehrbriefen".
4. Riĉigi vian bibliotekon per la svisaj eldonaĵoj "Du Amosentaj Noveloj" kaj "Ĉe la Sanktaj Akvoĵ" aŭ donaci tiujn librojn al via korespondanto en eksterlando.
5. Baldaŭ aliĝi al la Ferio Semajno de SES en Habernbad, por dank al progresiga kurso spertiĝi en kurs-gvidado.
6. Disdoni miajn propagandilojn en atendejoj de kuracistoj, dentistoj kaj aliaj lokoj, kie homoj havas tempon por legi trankvile.
7. Pligrandigi viajn lingvosociojn per multa legado.
8. Diligenta vizitado de Grupkunvenoj, de Regionaj Kunvenoj kaj la SES-tago.

Pro modesteco ni ĉesu peti plion!


Por viaj

BANKAFEROJ

nia sperta organizaĵo kun
62 filioj kaj agentejoj en
Svislando kaj aro da fidin-
daj korespondistoj en ek-
sterlando ĉiutempe estas
je via dispono.



SCHWEIZERISCHE VOLKSBANK
BANQUE POPULAIRE SUISSE
BANCA POPOLARE SVIZZERA



Bei Laurenz Herzog ist Bestreben
nur erste Qualität zu geben . . .

Laurenz Herzog agas laŭ princip'
nur doni ĉion en kvalit' . . .

Laurenz **HERZOG** Rheineck

Herren- und Damen-Konfektion
sinjora kaj sinjorina konfekcio

SEP VANGOFRAPOJ

de Karlo Aszlanyi

El la hungara lingvo tradukis
Ladislao Spierer

148 paĝoj, Fr. 2.60

„Altgrade rekomendinda aldoniĵo al nia
populara literaturo, kiun devus posedi ĉiu
humoramanta lernanto kaj lerninto de nia
lingvo!“ *Brita Esperantisto*

Eldonita de

THE ESPERANTO PUBLISHING CO. LTD.

Mendu ĉe

OTTO WALDER, EIGENHEIM, ROMANSHORN



**GALLI
HORLOGES**

Funkcias bonege kaj estas
fidindaj akompanantoj.

GALLI, la serioza entre-
preno liveras horloĝojn
de modesta ĝis plene aŭto-
mata tipo. Por membroj de
SES speciala prezo.

Je deziro elekt-sendaĵo.

HANS GALLI ZÜRICH Nüscherstr. 49

Membro de Svisa Esperanto Societo

Hotelo Metropol Bern

nia fama verda hotelo
kunvenejo de ESB
Esperanto-gazetoj
kaj biblioteko

Esperantistoj ĉiam bonvenaj Fam. A. Fischer

MIELO ENLANDA

Pura, delikata, bonaroma sendas
Esperantista Fermo JAYET Morges
en skatoloj je 500 gr Fr. 4.75
" " 1000 gr Fr. 8.75
" " 2000 gr Fr. 16.50
I. C. A., afranko & ujo entenata

ĈE LA SANKTAJ AKVOJ

La fama romano el la valeza altmontaro de J. C. Heer
Broŝurita en du partoj kune Fr. 6.10
Bindita en unu volumo (post apero)
Fr. 7.10

DU AMOSENTAJ NOVELOJ

La klasika „Imenlago“ de Th. Storm
kaj la ĉarma „Maruŝka“ de Mela
Escherich. Broŝurita Fr. 2.05

Eldonitaj de Svisa Esperanto Societo
Mendebla ĉe

O. Walder Eigenheim Romanshorn

Samideanoj

ĉu vi scias, ke manfaritaj sinjorĉemizoj, marko

«Coupe Parisienne»

estās nia specialaĵo? Ni rekomendas nin fari
viajn ĉemizojn, kiujn vi estonte bezonos



Membro de Svisa Esperanto Societo

Bonvolu eltranĉi, noti vian precizan adreson kaj
sendi la slipon al la firmo Hattemer & Cie.

La subskribanto interesiĝas por via ĉemizo.

Nomo:

Adreso:

Presejo por bonaj presajoj

*en esperanta, germana, itala, franca
angla kaj nederlanda lingvoj*



Presejo Clematide + Weilenmann Amriswil Tg.